

28-a Kongreso de SAT-Amikaro en Lausanne
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 500, 1973.05.09 & 12

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond.

Unu el la pilieroj de la esperanto-movado sendube estas Sennacieca Asocio Tutmonda. Kiel vi scias, tiu organizaĵo havas sekciojn ne laŭ la naciaj teritorioj, sed laŭ la lingvaj teritorioj. La sekcio por la franclingva teritorio nomiĝas SAT-Amikaro.

A.- Por la unua fojo SAT-Amikaro kongresis en Svislando. Tiu 28-a Kongreso de SAT-Amikaro okazis en Lausanne dum la paskaj tagoj. Ĝi grupigis 200 personojn.

Cl.- La sabaton 21-an de aprilo la alvenantoj miris, kiam ili vidis Lausanne tute blankan pro neĝado. Kaj la aŭtomobilistoj, kiuj alvenadis tra la ĵurasaj pasejoj, havis kelkajn malfacilaĵojn, ĉar la stratoj estis treege glitaj pro glacio kaj freŝa neĝo.

A.- Sed la vetero rapide reboniĝis, kaj oni povas diri, ke ne nur spirite, sed ankaŭ vetere, tiu 28-a Kongreso de SAT-Amikaro plene sukcesis.

Cl.- La sabaton posttagmeze okazis ekzamenoj. Ilin organizis la pedagogia sekcio de SAT-Amikaro en kunlaboro kun Franca Instituto por Esperanto. 13 personoj prezentigis, 11 sukcesis.

A.- Samtempe malfermiĝis la libroservo. 6 novaj verkoj eldonitaj okaze de tiu kongreso altiris la publikon. Jen iliaj titoloj :

Cl.- *Nouveau cours rationnel et complet d'espéranto*, 180-paĝa libro, estas kompleta lernolibro por franclingvanoj.

A.- *Une humanité, une langue [Unu homaro, unu lingvo]* de Simone Glodeau, 50-paĝa libreto, estas informilo pri esperanto tre bone farita, kiun la franclingvanoj estos kontentaj povi tralegi kaj disdoni.

Cl.- *Ne plu ludo* prezentas kolekton de noveloj de N. Barthelmess. Temas pri 130-paĝa libreto plaĉ-aspekta.

A.- Tiujn tri librojn eldonis SAT-Amikaro kaj SAT. La tri aliajn, kiuj estas multobligitaj studoj, eldonis Kultura Centro Esperantista. Jen iliaj titoloj :

Cl.- *Bibliografio de la publikaĵoj de Reinhard Haupenthal* estas tre faka eldonaĵo 22-paĝa, kiu ĉefe interesos bibliotekistojn.

A.- *La socia romano en esperanto* de Henri Vatré, 18-paĝa eldonaĵo, kontraŭe interesos vastan publikon. Estas prelego, kiun Henri Vatré prezentis en la kadro de tiu 28-a Kongreso de SAT-Amikaro.

Cl.- *Fine Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat kun komentario de Pierre Hirsch*, 25-paĝa eldonaĵo, liveras la tekston de 8 ĝis nun nekonataj leteroj de la fondinto de SAT.

A.- Jam rilate al la apero de tiuj 6 eldonaĵoj la 28-a Kongreso de SAT-Amikaro restos en la historio de la esperanto-movado kiel riĉiga okazintaĵo. Ankaŭ ĝia programo estis riĉiga.

Cl.- La sabaton vespere mi havis la okazon prelegi kun lumbildoj pri la *svisa federalismo kaj la monda federalismo*. En horeto mi provis montri, ke la svisa federalismo travivis diversajn etapojn kaj ke rilate al la monda federalismo pli kaj pli da juristoj partoprenas fakajn studojn. Ĝus aperis epok-fara verko en la franca lingvo : *Histoire et idéologie du mondialisme [Historio kaj ideologio de mondanismo]*, al kiu ni dediĉos plurajn radio-prelegojn.

A.- La dimanĉon 22-an de aprilo okazis ĉefe labor-kunsidoj. Interalie estis menciite, ke la italaj deputitoj Nicolazzi, Guerrini, Ballardini kaj Meucci, de la partioj Social-demokrata kaj Itala socialisma kaj demokrata kristana, prezentis al la Ĉambro de la Deputitoj de la Itala Parlamento leĝ-proponon N° 342 pri la Instruado de la internacia lingvo Esperanto en la superaj lernejoj en Italio ekde la mezgradaj lernejoj. Jam nun en Italio oni povas laŭleĝe instrui Esperanton en la 3-a, 4-a kaj 5-a klasoj de la elementaj lernejoj. Se la leĝ-propono estos aprobita, oni povos instrui Esperanton en la superaj lernejoj de Italio libervole, se en iu klaso minimumo da lernantoj petos tiun instruadon. Baldaŭ la leĝ-propono estos diskutata ĉe la 8-a Komisiono pri Edukado kaj Instruado de la Ĉambro de la Deputitoj. Esperanto estas prezentata ne nur kiel internacia lingvo, sed ankaŭ kiel pontlingvo por la lernado de la fremdaj lingvoj.

Cl.- La dimanĉon vespere la kongresanoj havis la okazon aŭdi folklore vestitan muzikiston, kiu ludis alpan kornon. Talentaj kantistoj kaj pianistino poste prezentis klasikaĵojn.

A.- La lundon posttagmeze la kongreso ŝipe ekskursis al la fama kastelo Chillon. Agrable milda vetero favoris tiun trankvilan veturadon. Ĉiuj povis admiri la famajn vitejojn de Lavaux kaj la neĝkovritajn montojn.

Cl.- Kiuj povis ankoraŭ resti la mardon, tiuj ĉeestis tuttagan ekskurson aŭtobusan, kies celo estis Gruyères. Ni alvenis en tiun alpan vilaĝeton ĵus kiam en la fromaĝejo oni metis la kazeiĝintan lakton en la ujojn, kie la grandaj fromaĝoj estas formataj. La vizitantoj ricevis ĉiujn necesajn klarigojn, kaj poste ili povis gustumi freŝan kremon kaj diversajn fromaĝojn.

A.- Ĉiuj havis poste multe da tempo por viziti la mezepokan vilaĝon Gruyères, kaj je tagmezo la aŭtobusoj veturigis la kongresanojn en grandan lignodomon aŭ ĉaledon, kie ĉiuj gustumis la svisan manĝaĵon fonduo.

Cl.- Tiu tipe svisa manĝaĵo konkludis tiun kongreson, kie ĉio disvolviĝis glate en malstreĉita atmosfero.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !